

tikolo, sciencistoj ofte enmetas pluan resumon de la enhavo en vaste konata lingvo. Mi mem ricevis de aliaj sciencistoj artikolojn, kiuj enhavis ne sole resumon en la lingvo de la teksto, sed kelkfoje ankaŭ unu aŭ du en aliaj lingvoj. Tiuj certigas, ke la nova informo rapide kaj efike disvastiĝas.

Sekvas, ke hodiaŭ la sciencisto devas kompreni resumojn en minimume 3 aŭ 4 lingvoj plej gravaj, kaj eĉ tiam li ne ĉiam trovas informon en la lingvoj, kiuj li regas.

La problemo pri tro multe da lingvoj klare vidiĝas; certe Esperanto devus esti utila tiurilate. Esperantistoj devus profiti el la bezono de la resumoj kaj koncentri sian laboron al la ŝanco prezentita, prefere ol verki originalajn artikolojn en Esperanto. Tiuj, kiuj pli urĝe bezonas la resumojn kaj ne havas liberan tempon por lerni plurajn novajn lingvojn, estas la universitataj studentoj, kiuj ĵus komencis pli profundajn studojn en elektitaj temoj. Certe ili bonvenigus la avantaĝon de unu lingvo por resumoj. Al la studentoj do devus celi iu kampanjo unua-instance.

Samtempe tuj necesas persvadi sciencajn verkistojn, ĉefe redaktorojn de periodaĵoj, ke ili enmetadu pluajn resumojn en Esperanto, eĉ se tiuj ĉi estus nur mallongaj. Sistema kunlaboro de esperantistoj certe necesus por prepari la resumojn komence de tia projekto. Se esperantaj resumoj ekaperus en periodaĵoj diverslingvaj, mi kredas, ke la memdaŭranta proceso establiĝus tiel, ke la uzado de Esperanto devigus scion de ĝi inter la legantaro.

Por lanĉi tian projekton, necesus specialistoj, kiuj kapablu traduki en Esperanton la resumojn haveblajn en ilia nacilingvo kaj meti ilin al la dispo de sciencistoj kaj studentoj en aliaj landoj.

Certe tio estas nur unu ebleco, por ke Esperanto plenumu hodiaŭan bezonon. Kiel pura lingvo por kulturaj interŝanĝoj ĝi ankoraŭ riskas morti, sed mi opinias, ke serioza provo uzi ĝin por solvado de ĉiutagaj problemoj en profesia komunikado, donas grandan eblecon de ĝia disvastigo kaj daŭrigo.

Redakta komento

estus superflua, se krom la bonegaj ideoj ne aperus en la artikoleto de d-ro Harrison pli-malpli eksplicita alvoko al la sciencistoj, ke ili verku en Esperanto ne originalajn traktaĵojn, sed prefere ties resumojn...

Nu, tiu ĉi ideo apenaŭ estas senripoĉa. Ĉar Esperanto ambicias roli en la scienco, ĝi devas disponi pri perfekta terminologio de la sciencaj disciplinoj. Jen, kie kuŝas la plej urĝa, nenial prokrastinda tasko de la sciencistoj, aplikantaj Esperanton. Solaj resumoj, kvankam prave rekomendataj, evidente ne liveras sufiĉe adekvatan okazon por tio.

J. Kavka

La malbeno de Babelo en sciencaj publikigaĵoj

Bernard Golden (Hungario)*

En lastatempe eldonita kolekto de prelegoj el scienca seminario organizita en *Ahrenshoop* (GDR 1978), troviĝas du kontribuaj, kiuj tuŝas la problemojn de publikigado kadre de la scienca apliko de Esperanto. Leginte tiujn du artikolojn, oni facile konvinkiĝas, ke la situacio rilate eldonadon de sciencaj verkoj en Esperanto neniam estis tute kontenta, kaj prognozaj por la estonteco apenaŭ estas bonaj. La seniluziiginta esperantista sciencularo ja povas havi unu konsolon: la situacio ekster Esperantio — en Babellando — kelkfoje estas same malbonstata. Antaŭ nelonge trafis en miajn manojn scienca revuo, enhavanta diskuton pri alispecaj publikigaj problemoj. Ĉar unu el la ĉefaj temoj rilatas al la lingvouzo en sciencaj periodaĵoj celantaj internacian legantaron, estas utile koni la opiniojn, prezentitajn de neesperantistaj erudiciuloj.

Bollettino del Centro Camuno di Studi Preistorici, eldonita en *Capodiponte*, Italio, estas internacia scienca periodaĵo dediĉita al la prahistorio. En la n-ro 15/1977 aperis raporto (p. 4-64) pri rondtabla diskuto koncerne la celon kaj perspektivon de la prahistorio. Inter pluraj aktualaj demandoj, la dudeko da kunlaborantaj sciencistoj tuŝis la temojn de la kolektado kaj konservado de sciencaj informoj en bibliotekoj kaj la disvastigo de rezultoj de reserĉo en la formo de publikigaĵoj, bone prezentitaj, kun ilustraĵoj, kaj laŭ rigora sistemo. *Emmanuel Anati*, la direktoro de la revuo kaj de *Centro Camuno di Studi Preistorici*, kiu estis la organizanto de la konferenco, pritraktis ankaŭ la lingvan problemon. Jen lia vidpunkto, kiu mi tradukis el la itala originalo.

“La publikigaĵoj devas esti alireblaj ankaŭ al la tuta scienca mondo kaj ne

* arĥeologo, *Csikász u. 11.III.3, H-8200 VESZPRÉM*

nur al kleruloj de certa geografia aŭ lingvistika zono. La tekstoj publikigitaj en la japana lingvo estas, kompreneble, tre interesaj, sed por ni nekompreneblaj. La samo estas vera por la publikigaĵoj, kiujn ni ricevas de la Armena Soveta Socialisma Respubliko, kiuj estas verkitaj en la armena. Ankaŭ tie ĉi, oni ne povas fari pli ol ekzameni la figurojn. Ne estas eskludeble, ke la japanoj havas la saman malfacilaĵon legi la italan, kiun ni havas, legante la japanan”.

Unu el la partoprenintoj, arĥeologo *De Marinis*, specifis la uzendajn lingvojn.

“Ĉiu publikigaĵo devas esti verkita en la lingvo de la legantoj, al kiuj ĝi direktas sin. Estas nature, ke publikigaĵo pri la arĥologio de Japanio estu verkita en la japana, same kiel publikigaĵo pri la itala arĥologio estu skribita en la itala”.

Kaj direktoro *Anati* aldonis:

“Estas du komunlingvoj, el kiuj almenaŭ unu estas konata al ĉiu klerulo: la franca kaj la angla. Ĉiu libro devus havi resumojn en tiuj ĉi du lingvoj. Tio devus esti la metodo sekvata de ĉiuj, krom se la aŭtoroj volas solaj verki por si mem.”

Jen la malnova rekantaĵo: du lingvoj de scienca elito, kiuj estas uzataj, ne kiel veraj laborlingvoj, sed nur kiel helplingvoj por verki resumojn de artikoloj, kiuj povas esti prezentitaj en iu ajn lingvo de la mondo. Ĉu tio estas racia maniero rigardi la aferon? Certe neos tion ĉiu fakulo, kiu tre bone scias, ke resumo de scienca artikolo ofte valoras nenion. Por serioza scienca laboro, same kiel ĉe la manĝotablo, oni bezonas la viandon, ne la sukron aŭ la aromon. Cetere, estas apenaŭ apogebla la argumento de la arĥeologo, kiu asertas, ke “ĉiuj publikigaĵoj devus esti verkitaj en la lingvo de la legantoj, al kiuj ĝi direktas sin”. Bone verkita artikolo pri grava temo povas havi intereson por tre vasta legantaro, kaj sciencisto kun larĝa vidpunkto volonte informiĝas pri esplor-rezultoj de kolegoj, kiuj specialistas pri aliaj geografiaj regionoj kaj historiaj periodoj. Do, ne estas eble elekti lingvon surbaze de tiel nebule difinita kriterio.

Ŝajnas, ke la redakcio de *Bollettino* por ne ofendi kolegojn, kies gepatra lingvo estas la itala, la germana kaj ankaŭ la hispana, akceptas artikolojn en tiuj lingvoj, kompreneble, kun akompanaj resumo en la franca kaj la itala. La rezulto estas granda malŝparo de papero. En alia volumo de la sama revuo (9/1972), enhavante informojn pri internacia simpozio organizita de *Centro Camuno di Studi Preistorici*, la resumo aperis en tri lingvoj: la itala

(52 p.) la franca (52 p.) kaj la angla (50 p.). Trifoje la sama teksto! Se nur unu lingvo estus uzata, oni estus povinta publikigi ne magrajn resumojn, sed la kompletajn tekstojn de la referaĵoj, kaj tio ja estus pli valora kontribuado al la disvastigo de sciencaj informoj. Kaj kion diri pri la raporto mem de la rondtabla diskuto? Ĝi ampleksas 60 paĝojn, preskaŭ duonon de unu n-ro de *Bollettino*, kaj ĝi montras skandalan lingvan diskriminacion: la tuta teksto estas en la itala kun eĉ ne unu resuma frazo en alia lingvo! Ŝajnas, ke la kleruloj de *Centro Camuno* ne trovis manieron efektiviĝi la rekomendojn fari-tajn dum la rondtabla pritraktado okazinta kvar jarojn antaŭe.

Por ke la direkto de *Centro Camuno* kaj la redakcio de *Bollettino* sciu pri efika solvo de la lingva problemo en internacia scienca periodaĵo, mi sendis al ili ekzempleron de unu el miaj publikigitaj artikoloj pri la prahistoria arto, verkita originale en Esperanto, por montri, ke estas eble uzi Internacian Lingvon en la faka sfero, pri kiu okupiĝas la sciencistoj de *Centro Camuno*.



kompletigas nun sian 33-an volumon,
kun datojaro 1982.

Baldaŭ aperos la kvar kajeroj de la volumo 34
(1983); ne forgesu rapide pagi vian abonon al
vialanda peranto de ISAE (vidu la liston en la
lasta kovrilpaĝo) aŭ rekte al
«Edistudio», cp 213, I-56100 Pisa, Italujo
pĉk 12230561

20 sv. fr. = 14 000 it. liroj